

22-23/11/2024

Gento, Belgio



ESPERANTO YOUTH
WORLD ORGANISATION

Pledante por lingva diverseco por plifortigi Eŭropon

CNJC, TEJO, CJE, YEN



Enkonduko

Eŭropo fieras pri riĉa mozaiko de lingvaj fonoj, kun pli ol 200 indiĝenaj lingvoj de almenaŭ 5 malsamaj lingvaj familioj. Ĉi tiuj lingvoj estas deponejoj de unikaj kulturaj identecoj, historioj kaj tradicioj. Konservado lingvan diversecon estas do esenca por protekti la kulturan heredaĵon de Eŭropo kaj antaŭenigi kulturan pluralismon.

La fakto ke eŭropanoj parolas tiom multajn malsamajn lingvojn, eble ŝajnas defio por politika integriĝo kaj regado. Tamen, ĝi ankaŭ spegulas la sindevontigon de la kontinento al demokrataj principoj kaj kultura pluralismo. Antaŭenigante lingvajn rajtojn, lingvan egalecon kaj multlingvecon en publikaj institucioj, Eŭropo povas fortigi demokratian partoprenon kaj certigi, ke lingvaj minoritatoj havas voĉon en decidofaraj procezoj.

Nuntempe, kelkaj decidofaraj procezoj ne sufiĉe konsideras la vidpunktojn de uzantoj de eŭropaj lingvoj kiuj ne apartenas al la grupo de 24 oficialaj EU-lingvoj. Kiel reliefigite de la Eŭropa Unio de la Surduloj kaj la Eŭropa Reto pri Lingva Egaleco (ELEN), ankoraŭ estas longa vojo antaŭen rilate al minoritatigitaj eŭropaj lingvoj (inkluzive de gestlingvoj kaj parolataj lingvoj).

Lingva diverseco ludas kernan rolon en formado de individuaj kaj kolektivaj identecoj. Por multaj eŭropanoj, lingvo estas ne nur ilo de komunikado sed ankaŭ kerna parto de ilia identeco. Akcepti lingvan diversecon antaŭenigas inkluzivecon, permesante al ĉiuj parolantoj de ajna lingvo plene esprimi sin kaj partopreni socian vivon sen timo pri marĝenigo aŭ diskriminacio.

Lingva diverseco ne estas nur fundamenta aspekto de la kultura heredaĵo de Eŭropo sed ankaŭ fonto de forto, rezisto kaj kreemo. Akcepti kaj antaŭenigi lingvan diversecon estas esence por konstrui inkluzivajn sociojn, antaŭenigi ekonomian kreskon, fortigi demokratajn instituciojn kaj plibonigi la tutmondan pozicion de Eŭropo en la 21-a jarcento.



Agoj faritaj en Eŭropo

Kiel reflektite en la Rekomendo 1134 de la Parlamenta Asembleo de la Konsilio de Eŭropo, kaj pli detale en la Eŭropa Ĉarto por Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj, adoptita en 1992 kaj subskribita de 33 membrolandoj, eŭropaj institucioj havas la devon antaŭenigi ĉiujn eŭropajn lingvojn.

Ĉi tiu bezono estis ankaŭ inkludita en la "Raporto pri la fina rezulto" de la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, specife en propono 48: "Minoritatlingvoj kaj regionaj lingvoj bezonas plian protekton, konsiderante la Konvencion de la Konsilio de Eŭropo pri Minoritataj Lingvoj kaj la Kadran Konvencion por la Protekto de Naciaj Minoritatoj". Ĉi tiu konferenco havis la partoprenon de 10,000 eŭropaj gejunuloj. Iuj el la edukaj kaj kulturaj programoj de EU subtenis projektojn pri lingvolernado. Pere de financaj programoj, kiel Erasmus+ kaj Kreiva Eŭropo, EU subtenis lingvolernadon kaj lingvan diversecon, ekzemple pere de moviĝaj agadoj, kunlaboraj projektoj kaj subteno al la programo "Eŭropaj Kulturaj Ĉefurboj".

Dank' al ĉi tiuj programoj, iuj sukcesaj projektoj nuntempe antaŭenigas lernadon kaj videblecon de regionaj kaj minoritataj lingvoj en Eŭropo. La programo Kreiva Eŭropo ankaŭ subtenas literaturan tradukadon por permesi pli vastan aliron al gravaj literaturaj verkoj kaj konservi lingvan diversecon en EU.

En iuj kazoj, la regulado estis sukcesa kaj plialtigis la uzon de lingvoj, kiel la eŭska, la ukraina aŭ la latva. Klopodoj ankaŭ estas farataj por la kataluna, irlanda kaj samea lingvoj. Sed en aliaj landoj, malgraŭ ĉi tiuj regularoj adoptitaj dum la 1990-aj kaj fruaj 2000-aj jaroj, tutmondiĝo damaĝas la sanon de kelkaj el niaj lingvoj. Sekve, pli grandaj klopodoj estas necesaj por certigi, ke Eŭropo konservas siajn diversajn lingvojn.

Kiel reprezentantoj de la junaj civitanoj de Eŭropo, la membroj de la Eŭropa Junulara Forumo estas plene dediĉitaj al konservado kaj fortigado de la lingva diverseco, kiun ni heredis de antaŭaj generacioj.



Alvoko al agado

Kun la celo certigi la longevivon de ĉiuj eŭropaj lingvoj, FoJE alvokas:

- Ĉiujn membroŝtatojn de la Konsilio de Eŭropo fari klopodojn por ke neniu eŭropa lingvo perdiĝu dum ĉi tiu jarcento. Ĉi tio inkluzivas subskribon kaj ratifon de la Eŭropa Ĉarto por Regionaj aŭ Minoritataj Lingvoj kaj ne kontraŭstari proponojn por la enkonduko de laborlingvoj en eŭropajn instituciojn. Ĉiuj lingvoj, sendepende de la nombro de parolantoj, inkluzive de gestlingvoj, estas komponantoj de la riĉa kultura heredaĵo de landoj, kaj eŭropaj landoj devus fari pli fortajn kaj pli konkretajn paŝojn por rekoni ĉiujn lingvojn ene de iliaj limoj kaj protekti ilian uzon.
- Eŭropajn instituciojn ebligi kaj antaŭenigi plian lingvan diversecon en siaj internaj laborlingvoj kaj garantii lingvajn rajtojn per akcepto de lingvoj proponitaj de membroŝtatoj, kiel la kataluna, kiu estis proponita de Hispanio al la Konsilio de la Eŭropa Unio en 2024. Eŭropaj institucioj devas ankaŭ investi pli da rimedoj en produktado de materialoj por faciligi lingvolernadon, protekti kaj antaŭenigi ĉiujn lingvojn, kaj ebligi pli vastan civitanan aliron al traduk- kaj interpretoservoj por tiuj, kiuj bezonas ilin.
- La Konsilion de Eŭropo, en kunlaboro kun la Eŭropa Unio, plu antaŭenigi la Eŭropan Tagon de Lingvoj kiel okazon por konscii pri multlingveco kaj inkluziveco. Por plifortigi ĝian efikon, pli da financado kaj rimedoj devus esti asignitaj por la organizado de eventoj kaj materialoj por ĉi tiu okazo. Tio povus signife plifortigi lokajn kaj regionajn klopodojn por konservi lingvan diversecon.



- Naciajn Junularajn Konsiliojn kaj aliajn membrajn organizojn taksu siajn nunajn lingvouzajn politikojn, konsideri eblajn efikojn de lingvouzo en siaj agadoj, kaj instigi la uzon de diversaj naciaj lingvoj en sia laboro kiam ajn eble. Ĉi tio inkluzivas produktadon de informaj materialoj kaj kampanjoj en minoritataj lingvoj en la kampoj de la agado de la organizoj. Aldone, ili estas instigitaj regule organizi agadojn, kiuj antaŭenigas la uzon de lokaj lingvoj kaj ebligas interkulturan lernadon.
- Eŭropajn civitanojn kaj civilan socion konscii pri la valoro de lingva diverseco kaj dividi ĉi tiujn valorojn kun aliaj. La volo de homoj estas, ke ĉiuj lingvoj estu konservitaj vivaj, kaj ke solvoj estu trovitaj al problemoj pri lingvaj rajtoj je internacia, nacia, regiona kaj loka niveloj.



ESPERANTO YOUTH
WORLD ORGANISATION